La 20an de aŭgusto 2014

Kio okazis dum la pasinta monato en Fukuŝima?

Por partopreni en la UK en Bonaero, mi estis en Argentino ekde la 26a de julio ĝis la 10a de aŭgusto. Dume venadis la ĵurnaloj Fukuŝima-Minpoo al mia hejmo. Hodiaŭ mi raportos, kio okazis dum tiu periodo en Fukuŝima. Ĉiujn artikolojn mi verkis surbaze de tiu ĵurnalo. Estas miaj mallongaj rimarkoj fine de la artikoloj.

1. Purigado en la vilaĝo Iitate

Kiam okazis la nuklea akcidento, ventoj flugis nordokcidenten de la nuklea centralo. La vilaĝo Iitate malfeliĉe situas laŭ la vojo de tiuj ventoj kaj estis poluita de forta radioaktiveco. Ĉiuj vilaĝanoj devis fuĝi eksteren kaj nun dise loĝas en diversaj lokoj. La registaro planas revenigi ilin, purigonte la kampojn per jenaj manieroj :

1. skrapi surfacan teron de kampoj je 5 centimetroj, kiuj estas poluitaj de radioaktiva cezio
2. enmeti puran teron el montetoj

Tamen la problemo estas, ke tiu 5-centimetra tavolo enhavas necesajn elementojn por plantoj, ekzemple mineralojn kaj kalion. Por fari tiun novan teron sufiĉe fekunda, oni bezonos multajn jarojn. S-ro Satoo Haruo, 65-jara, diras: « Ni faris la teron fekunda per multgeneracia klopodado. Estos ne facile reakiri tiun staton, eĉ se oni uzos kemian sterkon ».

* Oni devos konservi tiun skrapitan teron kiel radioaktivan rubaĵon.

2. Disflugo de radioaktiva polvo

En la lasta somero radioaktiva polvo disflugis, kiam oni rearanĝis detruitaĵojn en la reaktoro n-ro 3. En aŭtuno oni detektis radioaktivan cezion pli fortan ol la normo el la rikoltita rizo en la urbo Minami-Sooma. La guberino kaj la urbo forte protestis kontraŭ TEPCO kaj postulis taŭgan kontraŭrimedon.

TEPCO baldaŭ rearanĝos detruitaĵojn en la reaktoro n-ro1. La 17an de julio TEPCO klarigis, ke por preventi disfluon de radioaktiva polvo, ĝi

plioftigos disĵeton de « kontraŭpolva materialo » kaj akvo. Ĝi insistas, ke la kontraŭrimedo estas plibonigita kaj ne okazos problemo, sed multaj dubas pri la efiko.

* Ĉiam rimedoj estas tre primitivaj, kvankam nukleaj centraloj estas tre modernaj.

3. Fukuŝima plu petos subtenon en la tuta Japanio

Ekde aŭgusto funkciuloj de la gubernio Fukuŝima vizitos komunumojn, kompaniojn, universitatojn kaj amaskomunikilojn en la tuta Japanio por danki ilin kaj peti de ili pli da subteno. La gubernio jam ricevis multegon da helpo, sed ĝi bezonas pli da helpo por restariĝo.

* La registaro estas la plej malbona helpanto, ofte malhelpanto.

4. Junaj ambasadoroj

Tri gelernantoj vizitos Parizon en aŭgusto kiel « ambasadoroj de restariĝo de Fukuŝima ». Ili estas f-ino Hatakejama Seena (17-jara), s-ro Nakamura Keisuke (17-jara) kaj f-ino Komedoo Asumi (12-jara). Ili sendos fortan mesaĝon pri restariĝanta Fukuŝima al la mondo.

* Ili diras, ke ili lernos la francan, sed ili lernu Esperanton.

5. Persikoj

La 19an de julio Fraŭlinoj Persiko disdonis persikojn al pasaĝeroj en la stacidomo Fukuŝima por propagandi bongustajn fruktojn kaj forviŝi misfamon de Fukuŝima.

* Ĉiun someron mi gustumas persikojn el Fukuŝima.

6. TEPCO enĵetos kvantegon da glacio

Troviĝas 11000 tunoj da poluita akvo en la fosaĵo inter la reaktoroj n-ro 2 kaj 3 kaj la maro. TEPCO provas elpreni tiun akvon, ŝtopante ĝian kolon ĉe la reaktoroj per glacio, kaj por tio ĝi enĵetos 15 tunojn da glacio kaj seka glacio ĉiun tagon.

La 7an de aŭgusto TEPCO publikigis, ke oni ne sukcesis glaciigi la kolon, tial ĝi komencis enĵeti 27 tunojn da glacio ĉiun tagon.

Multaj timas, ke la plano konstrui glaciigitan termuron ĉirkaŭ la reaktoroj ne sukcesos, ĉar TEPCO ne povas glaciigi eĉ tiun malgrandan parton.

* Kompanio pri glacio profitas.

7. Fungo *ŝiitake* unuan fojon surmerkatiĝis

S-ro Kikuĉi Hisamicu 65-jara surmerkatigis fungon *ŝiitake* unuan fojon post la nuklea akcidento en 2011. Li estas ĝoja, sed samtempe timas, ke ĝi ne vendiĝos bone. Fungoj facile ensorbas radiaktivaĵojn, do estas malfacile produkti nepoluitan *ŝiitake*-on, sed finfine li sukcesis.

* Fungo-kolektado en montetoj estis ŝatata hobio de multaj homoj, sed ili jam rezignis.

8. Okazis Ĉevalfestivalo en la urbo Minami-Sooma

La regiono Sooma estas fama pro Ĉevalfestivalo, en kiu viroj batalas en tradicia, samuraja kostumo, rajdante sur ĉevalo. Ĝi okazis la 26an, 27an kaj 28an de julio. Pro la cunamo kaj la nuklea akcidento ankaŭ multaj « samurajoj » (militistoj en la feŭdisma epoko) suferis kaj suferas. Sed ili revenis por batali. Ili neniam malvenkas.

Nia somero

Versita de Nemoto Masajuki

De la frumatena maro
ekblovas ventetoj,
Hufsonoj pli kaj pli klare aŭdiĝas.

Kiam venas tiu ĉi sezono,
Ni varmiĝas.
Ni ekstaras.

Ni venkas ĉiujn malfacilaĵojn,
En ni fluas ja sango de samurajoj.

Ĉu sune, ĉu nube,
Ĉu pluve, ĉu vente,
en ĉiu veterkondiĉo,
Ĝi daŭras de mil jaroj.
Sooma-Ĉevalfestivalo.
Ni, samurajoj de Sooma, neniam surpriziĝu,
Ni devas protekti, kion ni devas protekti.

Tiamaniere ni vivas.
Ni batalkriu !
Hurao ! Hurao !
Hurao ! Hurao ! Hurao !

Aĥ, henas ĉevaloj!
Aĥ, trumpetado per konko !
Aĥ, eĥas signalfajro!

Impetu!
Impetu al atakantaj malamikoj!
Viroj de Sooma!

Venis nia varma somero !

* Bedaŭrinde fine de julio okazas ankaŭ UK, do mi ne havas okazon vidi la spektaklon.

9. Imago de Fukuŝima

La 28an de julio la gubernio Fukuŝima publikigis rezulton de enketo pri « Imago de Fukuŝima » al 1077 homoj loĝantaj en la metropolo.

(1) Imago de Fukuŝima

Gubernio de nukleaj centraloj:	57,8%
Strebas :	52,0%
Plena de naturo :	30,3%
Kompatinda :	23,2%

Stagnanta :	21,3%
Pozitiva :	19,0%
(2) Intereso pri Fukuŝima	
Havas intereson kiel sian aferon:	15,7%
Havas intereson:	52,3%
(3) Helpo al Fukuŝima	
Konkrete helpas:	9,7%
Havas volon helpi :	71,2%

* Fukuŝima kaj mia gubernio Gunma estas najbaroj, tial mi sentas, ke Fukuŝima estas mia frato.

10. TEPCO planas forĵeti “purigitan” akvon

La 7an de aŭgusto TEPCO klarigis al la fiŝistoj planon forĵeti “purigitan” akvon en la maron. Ĉiun tagon 400 tunoj da akvo enfluas sub la reaktordomojn kaj poluiĝas. Nun TEPCO konservadas tiun akvon en akvujoj kaj la nombro de la akvujoj pli kaj pli multiĝas, do kiel solvi tiun problemon estas la plej grava. Por malmultigi la kvanton de poluita akvo, TEPCO planas forĵeti tiun akvon, elpreninte preskaŭ ĉiujn radioaktivaĵojn kiel cezion kaj stroncion krom tricio. Fiŝistoj en Fukuŝima forte protestas kontraŭ TEPCO.

* TEPCO planas forĵeti senlime tricion, radioaktivaĵon, en la maron. Tio ne estas permesebla.

HORI JASUO